

LA JUNA VIVO

DUSEMAJNA
ORGANO

POR LA
JUNULARO



Redakcio kaj Administrado:
West-Graifdijk (N.H.)
Nederlando.
Gironumero 209354 Nederlando.

Nederlando: jarabono f 0,75
Unuobla ekz. f 0.03
duobla ekz. f 0.06
Aliaj landoj: jarabono f 1.00.
(3 D. kr. 2,7 Sv. kr.)

Por progresintoj.

LA VESPERO ANTAŬ LA FOIRTAGO.

(Estis la tago antaŭ la granda foiro en Örebro, kaj pluvis torente; la vojoj fariĝis kvazaŭ riveroj kaj la homoj, kiuj estis survoje kun sia brutaro, ege suferis. La bestoj estis tiel elĉerpitaj, ke ili ne plu volis fari unu paŝon, kaj multaj bestoj ekkuŝis sur la vojo por montri, ke ili ne povas marŝi pluen. Ĉiuj, kiuj loĝis ĉe la vojo, devis malfermi la pordojn al la foir-vizitontoj.

Fariĝis plen-plene, ne nur en la familia ĉambro, sed ankaŭ en la staloj kaj budoj. Inter la brutaro estis kompatinda, maljuna ĉevalo, kiu ege deziris trankvili en riĉa bieno, flanke de la vojo, ĉar ĝi tie naskiĝis. Kvankam ĉiuj pordoj estis fermitaj, la ĉevalo kaj multaj aliaj bestoj sukcesis enpenetri tra pordo, kiun la ŝtormo puŝe malfermis.)

En la riĉa farmdomo oni ankoraŭ ne enlitiĝis.

La mastro tie estis tridek kvinjara viro. Li estis alta kaj aspektis dignoplene kun bela, malgaja vizaĝo.

Tiun tagon li estis eksterdome kaj fariĝis malseka, kiel ĉiuj homoj, kaj ĉe la vespermangŝo li petis al sia maljuna patrino, kiu ankoraŭ mastrumis en la biendomo, ĉu ŝi volas ekbruligi fajron, por ke li povu sekigi siajn vestojn. La patrino faris malgrandan fajron, ĉar en tiu domo ili estis ŝparemaj rilate brullignon, kaj la bienposedanto pendigis sian jakon sur seĝon antaŭ la fajro.

Poste li metis piedon sur la fajruj-ŝtonon kaj apogis brakon sur genuo kaj tiel li restis fikse rigardanta en la fajron. Tiel li staris senmove dum du horoj, nur kelkfoje li ĵetis pecon da ligno en la fajron. La patrino forprenis la vespermangŝon kaj ordigis lian liton kaj poste ŝi eksidis en la malgranda ĉambro. De tempo al tempo ŝi iris al la pordo kaj mire rigardis al sia filo, kiu staris ĉe la fajro kaj ne enlitiĝis.

„Estas nenio, patrino. Mi nur pensas pri la estinto,” li diris.

Estis, ke li, preterpasante gastejon, renkontis ĉeval-komerciston, kiu demandis al li, ĉu li deziras aĉeti ĉevalon. La komercisto montris al li maljunan beston, kiu aspektis tiel mizere, ke li demandis la viron, ĉu li estas freneza, ke li provas vendi tian aĉan beston.

„Ho ne, sed mi pensis, ke vi, ĉar la ĉevalo antaŭe apartenis al vi, eble dezirus havigi al ĝi trankvilan vivo-finon,” respondis la komercisto.

Tiam li rigardis al la ĉevalo kaj rekonis ĝin. Estis besto, kiun li mem bredis kaj dresis. Sed ĉi tio tute ne estis motivo por aĉeti la beston. Ne, certe ne. Li ne estis tiel freneza forĵeti sian monon. Sed vere estas, ke la vido de la ĉevalo vekis en li ĉiajn memoraĵojn, kaj tiuj memoraĵoj malebligis lin iri en la liton.

Jes, tiu ĉevalo estis forta kaj bela besto. La patro lasis la prizorgadon al li. Li unua veturis per ĝi. Ĉi tiun ĉevalon li ŝatis pli ol iun alian beston. La patro plendis, ke li donas al ĝi tro multe da nutraĵo, kaj ofte li kaŝe donis avenon al ĝi.

Neniam li volis piede iri al la preĝejo; de kiam li posedis la ĉevalon, li ĉiam veturis. Estis nur por paradi per la ĉevalo. Mem li venis kun vestoj, kiuj estis teksitaj kaj kudritaj hejme, kaj ankaŭ la veturilo estis nur simpla kaj ne kolorigita, sed la ĉevalo estis la plej bela, kiu staris sur la placo.

Iam li kuraĝis alparoli la patron, ĉu li ne aĉetus drapajn vestojn kaj kolorigus la veturilon. La patro staris muta. La filo pensis, ke la maljunulo ricevos atakon de apopleksio. Li poste provis komprenigi al la patro ke li, havanta belan ĉevalon, ankaŭ mem decidu aspekti bele. La patro nenion respondis. Sed kelkajn tagojn poste li iris kun la ĉevalo al Örebro kaj vendis ĝin.

Estis amare. Sed estis klare, ke la patro timis, ke la ĉevalo logos lin al lukso kaj malŝparemo, kaj nun, post tiom da tempo, li devis konfesi, ke la patro pravis. Sed komence li estis ege malĝoja. De tempo al tempo li iris al Örebro nur por, starante surstrate, vidi la ĉevalon preteriri, aŭ ŝteliri en la stalon kun peceto da sukero.

„Se mi fariĝos la mastro,” li pensis, „mi antaŭ ĉio reaĉetos mian ĉevalon.”

Nun la patro estis morta, kaj li mem posedis la bienon jam kelkajn jarojn, sed li ankoraŭ ne klopodis reaĉeti la ĉevalon.

Li dum longa tempo ne pensis pri la besto, ĝis la hodiaŭa vespero. Estis strange, ke li povis plene forgesi ĝin. Sed la patro estis viro, kiu energie ordonis, kun firma volo, kaj kiam la filo estis plenkreska,

kaj ambaŭ kunlaboris, la patro forte influis lin kaj ĉiam ŝajnis al li, ke la patro pravus en ĉio, kion li faris. Kaj dum li mem estis la



mastro, li provis en ĉio agi tiel, kiel lia patro farus.

Li certe sciis, ke la homoj diras, ke la patro estis avara, sed tamen estas bone ne tro larĝe malfermi la monujon.

La posedaĵon, kiun oni ricevis, oni ne malzorgu. Estas pli bone

nomiĝi avara, kaj posedi bienon sen ŝuldoj, ol droni en ŝuldoj kiel la aliaj terposedantoj.

Tiun konkludon li atingis post longa pripensado; tiam li ektimis, ĉar li aŭdis strangan voĉon. Ŝajne li aŭdis akran, mokan voĉon, kiu precize ripetis, kion li pensis.

„Estas pli bone nomiĝi avara kaj posedi bienon sen ŝuldoj, ol droni en ŝuldoj kiel la aliaj bienposedantoj.”

Sonis, kvazaŭ iu mokis lian saĝon, kaj li preskaŭ fariĝis kolera, kiam li rimarkis, ke ĉio estas eraro. Ekventis kaj li staris ĉi tie, ĝis kiam li fariĝis dormema.

Li rigardis al la murhorloĝo. Ĝi ĵus forte batis la dekunuan. Estis terure malfrue jam. „Fariĝas tempo, ke vi enlitiĝu.” li pensis. Sed tiam li memoris, ke li ankoraŭ ne ĉirkaŭiris la farmdomon, kiel li kuŝime faras, por vidi, ĉu ĉiuj pordoj kaj fenestroj estas fermitaj kaj ĉiuj lumoj estas estingitaj.

Tion li neniam malatentis post kiam li fariĝis la mastro. Li surmetis sian jakon kaj iris eksteren en la ventegon.

Li trovis ĉion en bonordo, escepte ke la vento large malfermis la pordon de la garbejo. Li iris eksteren por preni la ŝlosilon, kaj fermis la pordon. Poste li reiris al la granda ĉambro, demetis la jakon kaj pendigis ĝin antaŭ la fajro. Sed ankaŭ nun li ne enlitiĝis sed iris tien kaj reen en la ĉambro. Estis terure ekstere, pro la morde malvarma vento kaj la neĝo, miksitaj kun pluvo. Kaj lia maljuna ĉevalo staris tie en la ventego, sen iu ajn ŝirmo. Li ja povus havigi al sia amiko tegmenton super la kapo, nun kiam li estas en la proksimeco.

Li eksidis sur seĝon kaj apogis la kapon per la manoj. Subite lia vizaĝo ektremis, kaj larmoj aperis en la okulojn, kiujn li rapide forviŝis. Aperis novaj larmoj, kiujn li same rapide forviŝis, sed nenio helpis. Venis ĉiam novaj.

Nun lia patrino malfermis la pordon de la malgranda ĉambro kaj li rapide turnis sian seĝon tiel, ke ŝi vidis lin nur surdorse. Sed ŝi certe rimarkis ion eksterordinaran, ĉar ŝi staris longan tempon malantaŭ li, kvazaŭ atendente, ke li diros ion. Ŝi certe devos helpi lin.

La patrino longe parolis kun sia filo, kaj dum ŝi parolis li ĉesis plori kaj fine li sidis tie kun tia bona esprimo sur la vizaĝo, kaj aspektis, kvazaŭ li estas alia homo. Kaj ĉiam li karesis la maljunan sulketan manon de sia patrino.

„Nun ni iru liten,” ŝi diris, vidante, ke li estas trankvila.

„Ne,” li diris kaj rapide ekstaris. „Mi ankoraŭ ne povas enlitiĝi.

Estas ankoraŭ gasto, kiun mi devas akcepti ĉi-nokte.”

Li diris nenion plu, sed rapide surmetis sian jakon, ekbruligis la lanternon kaj iris eksteren. Estis akra vento, sed kiam li venis sur la perono, li komencis kanteti. Irante sur la korto li aŭdis pordon, batanta pro la vento.

„Certe estas garbej-pordo, kiun la vento malfermas,” li pensis kaj iris por fermi ĝin. Momenton poste li staris ĉe la pordo kaj vidis, ke sur la tuta planko kuŝas dormanta brutaro. Neniu homo estis videbla. La bestoj ne estis ligitaj, sed kuŝis dise sur la pajlo.

Li fariĝis kolera pri la enpenetrintoj, kaj vokis kaj kriis por vekii la dormantojn, kaj peli ilin eksteren. Sed ili restis kuŝantaj, kvazaŭ ili aŭdis nenion. La sola, kiu levis sin, estis maljuna ĉevalo, kiu tre malrapide venis al li. — Subite la farmisto kvietiĝis. Li rekonis la ĉevalon jam pro ĝia irmaniero. Li levis la lanternon, por ke li povu vidi ĝin kaj la besto venis al li kaj metis la kapon sur lian ŝultron. Kaj la farmisto komencis karesi ĝin. „Mia kara ĉevalo, kion ili faris al vi? Jes, mi reaĉetos vin. Vi neniam plu foriros de tiu ĉi loko. Bonajn tagojn vi havos, amiko. Al la aliaj, kiujn vi kunprenis, mi permesas resti ĉi tie, sed vi kuniras al la stalo. Nun mi povas doni al vi tiom da aveno, kiom vi ŝatas, sen fari tion kaŝe. Vi ankoraŭ ne estas tute eluzita. Vi iam fariĝos la plej bela ĉevalo sur la preĝeja placo. Mia kara ĉevalo!”

(Fragmento el: Selma Lagenlöf: LA MIRAKLA VOJAGO DE NILS HOLGERSSON).

RICEVITAJ LIBROJ

„Ĉu vi parolas Esperante?” (Esperante-Ĉina konversacia gvidilo por komencantoj; kompilis Cajfonso. La libreto estas mendebila ĉe la „Ĉina Mondlingva Librejo, 15 Shang Sieh Chiaj, Peiping, Ĉinujo.

Theodor Storm: **Imenlago**. El la germana lingvo tradukis Alfred Bader kun ĉinlingvaj klarigoj de Cajfonso. Mendebila ĉe „Ĉina Mondlingva Librejo, 15 Shang Sieh Chiaj, Peiping, Ĉinujo. Prezo: 0,90 sv. fr. aŭ 3 resp. kuponoj, poŝtaj aŭ de U. E. A.

La Morea perlo, de D. Simson. (El la nederlanda tradukis R. Del-pasko. Mendebila ĉe Ideala Esperanto Biblioteko, Helmond, Nederlando. Prezo: 1.40 sv. fr., aŭ Ned. Guld. f 0.70. (Nur per antaŭ-pago).

KARA REDAKTORINO.

La spertoj kaj la plezuro, kiujn ni travivis, uzante „La Junan Vivon” por nia infankurso instigas kaj rajtigas nin esprimi nian sinceran dankon pro viaj bonaj iniciativo kaj laboro por nia celo.

Jam antaŭ kelkaj jaroj ni klopodis starigi infankurson, sed pro manko de taŭgaj instruiloj la afero tute malsukcesis. Alie estas nun. Ni eble kontribuos al la prospero de nia kara lingvo, komunikante pri nia nuna kurso kaj pri ĝia aranĝado.

Fine de septembro, 1934, la kurso komenciĝis kun proksimume 40 infanoj. Nun, post duonjara studado, restas ankoraŭ pli ol 30.

El kelkaj instrumentoj ni elektis fine, post matura pripensado, „La Junan Vivon”, kaj la spertoj pravigas nin diri, ke ni elektis ĝuste. „La Juna Vivo” montriĝas: malkara, ĉiurilate taŭga, agrabla kaj alloga por la instruanto kaj por la infanoj, kiuj lastaj ĉiam senpacience atendas la novan numeron.

Nun kelkaj informoj pri la aranĝado.

Infanoj de niaj membroj pagas 5 cendojn semajne, la aliaj pagas 12½ cendojn. Du infanoj el unu familio pagas 17½ cendojn. Per tiu mono ni unue pagis 30 abonojn al „L. J. V.”. La restantan monon ni ŝparas por fari en Julio ekskurson kun la infanoj al la insulo Teksel, kie niaj samideanoj jam promesis kunlaboron. Tiel ni ligas la utilon kun la plezuro. — Nun eble legantoj demandas: „Kaj la mono por la kursejo?” Por tio ni trovis jenan solvon: Ni okazigas la kurson mard- kaj ĵaŭdvespere, de la 7a ĝis la 8a horo en la salono, kie ni de la 8a ĝis la 10a horo okazigas niajn daŭrigan kaj komenc-kursojn. Ni do ne bezonas pagi lumonon por nia infankursejo, ĉar ni jam aliel pagas la salonon.

Eble kelkaj estraroj aŭ kursgvidantoj trovos nian solvon imitinda. Ni almenaŭ esperas tion en la intereso de nia lingvo kaj finos ĉi tie atentigante tamen ankoraŭ unufoje ĉiun seriozan kursgvidanton en kiu ajn lando, aŭ mondparto pri „LA JUNA VIVO”, kiu certigas plezuron kaj sukceson.

LOKON POR „LA JUNA VIVO”.

Harlemo 27-2-'35.

K. STIEKEL.

Se eksterlandanoj grupe abonas la gazeton, ili pagas nur la nederlandan abonprezon.

LA MUELILO
(GERMANA POPOLKANTO)



La radoj rapidas, sin turnas la ŝton', klip klip!

Muelas tritikon por nia la bon', klip klip!

Infanoj tre ŝatas la kukon el ĝi,

Bakisto, patrino ĝin faras por ni.

Klip klip! Klip klip! Klip klip!

trad. Erna Rieckmann-Sindhwad.

Bruselo, Belgujo.

LUDOJ.

Tio pensigas min pri

Oni sidas ĉirkaŭ la tablo. Unu el la personoj diras ekz: „Mi pensas pri kaldrono.” La dua diras: „ Kaldrono pensigas min pri vaporo.”

La tria: „Vaporo pensigas min pri ŝipo.” La kvara: „Ŝipo pensigas min pri vojaĝo.” k.t.p.

Post kelka tempo oni ricevas la vortojn en kontraŭa sinsekvo, komencante per la lasta vorto, kaj finante per la unua (kaldrono).

Ĉiu, kiu eraras, ne plu rajtas ludi.

Tiel oni povas ekzerci per multaj vortoj.

West-Grafdijk.

N. K.


1				2			3
	█	█	█		█	█	█
	█	4	5		█	6	7
	█		8		█		9
	█	10			█	11	
	█	12			█		
13			█	14			

Mechelen, Belgujo.

Horiz: 1. ŝtonĵetilo; 4. persona pronomo; 6. konjunkcio; 8. sufikso, indikas grupon; 9. prefikso; 10. malgrande; 11. ŝtonaĵo(rad); 12. floro(rad); 13. nombro; 14. donas la rozo(rad).

Vert.: 1. pligrandiĝas; 2. kio pezas pli ol necesas; 3. aĵo; 5. en la muziko; 7. grupo; 10. faras la kamparano(rad).

H. RAINSON.



a, a, a, a, a, a, e, e, n, o, o, p, p, p,
p, r, r, s, ŭ, ŭ.

La vortoj signifas, horizontale kaj vertikale:

1. birdon; 2. adverbbon.

Riga, Latvujo.

B. R.

Inter la sendintoj de la ĝustaj solvoj ni disdonos 4 premiojn. Ni akceptas solvojn ĝis la 15-a de Majo.

LA CERVO KUN LA ĈERIZARBETO.

Barono de Münchhausen rakontas:

„Foje, kiam mi ne plu havis kuglojn, mi hazarde renkontis la plej belan cervon, kiun mi iam vidis. Ĝi haltis kaj fikse rigardis min, kvazaŭ sciante, ke mi ne povas pafi. Mia ĉasist-instinkto ne toleris tion kaj mi ŝargis mian pafilon per kernoj de ĉerizoj, kiujn mi ĵus manĝis. Mi celis kaj trafis la beston en la kapon, ĝuste inter la kornaro. Momenton la pafado svenigis ĝin, sed tuj ĝi rekonsciiĝis kaj forrapidis.

Kelkajn jarojn poste mi estis en la sama arbaro, sed imagu mian miron, kiam mi renkontis belegan grandan cervon, kiu portis inter sia kornaro ĉerizarbeton alta du aŭ tri metrojn.

Tiam mi rememoris mian antaŭan renkontiĝon kaj komprenis, ke ĝi estas la sama besto. Mi mortpafis ĝin kaj havis nun samtempe miajn tagmanĝon kaj deserton, ĉar de la arbo pendis la plej bon-gustaj ĉerizoj, kiujn mi iam manĝis!”

Amsterdamo, Nederlando.

C. v. T.

Por komencantoj.

LA KARDELO.

Kiam Dio kreis la birdetojn, li donis al ili piedojn por salteti kajflugilojn por flugi kaj beketojn por manĝi kaj por kanti. Kaj kiam ĉiuj estis pretaj kaj staris ĉirkaŭ li, Dio prenis penikon kaj kolorilojn kaj pentris sur ilin multkolorajn plumojn. La kolombo fariĝis blanka kaj ricevis bluan rubandon ĉirkaŭ la kolo. La kanario aspektis bel-flave kaj la korvo brilis tutnigre. Ĉiuj birdoj estis grandioze kolorigitaj.

Nur unu restis, ĉar ĝi staris malantaŭ la aliaj kaj ĉar ĝi estis tro modesta. Ĉi tiu estis la kardelo.

Kiam ĝi fine alvenis, Dio ne plu havis kolorojn. Li nur vidis la malplenajn ujojn. Jen esploris la bedaŭrinda birdeto, ĉar ĝi ne plu povas ricevi tiel multkoloran belan veston, kiel la aliaj.

Sed la bona Dio sentis treegan kompaton kaj diris: „Konsolu vin, en ĉiu ujeto ankoraŭ restis malmulta kolorilo. Tion mi ankoraŭ povas uzi por vi.”

Kaj Dio pentris la kardelon iomete ruĝa, iom blua kaj nigra, iomete verda kaj el ĉiu ujeto li prenis la restaĵon kaj multkolorigis la bravan kardelon.

Tiel ĝi fariĝis la plej bela el la birdoj kaj ĝi dankis Dion, ke li kolorigis ĝin tiom bele.

Aŭstrio

J. WIESBÖCK.

SPRITAJO.

„Nun kara sinjorino, fine mi revidas vin. Kiel do vi fartas?”

„Ho, mia farto estas tute bona; sed nun hejme la vivo fariĝis kvieta kaj teda, de kiam mortis mia orfiŝo.”

Nanterre, Francujo.

R. M.

KORESPONDADO:

H. D. Amsterdamo: Via rakonto taŭgas nur por plenaĝuloj.

E. H. — K. Danujo: La enhavo ne tute kontentigas min.

Al ĉiuj, kiuj sendis poemojn: Mi nur malofte povas enpresigi poemojn. Ili ĝenerale ne estas facilkompreneblaj.

Al la fabeltradukantoj: La plej multaj fabeloj estas nur interesaj por 7 ĝis 9 jaraj infanoj. Por nia gazeto mi preferas rakontojn de nuntempaj aŭ toroj.

LA SIMIO AŬ LA RUZA AVARULO.

Iu avarulo loĝis tiel proksime de fervojo, ke li, starante en sia ĝardeno, povis vidi la homojn en la vagonaro.

Kompreneble ankaŭ la homoj povis rigardi en la ĝardenon de la avarulo.

Iun tagon maŝinisto rimarkis grandan ladan simion en la ĝardeno. La besto estis ruĝkolora, kaj ho—ve ĝi elpendigis la langon, kvazaŭ mokante la preterirantajn homojn. La maŝinisto furioziĝis kaj prenis grandan karbon, kiun li ĵetis al la kapo de la mokanta besto. La karbo tamen flugis preter la kapon kaj falis en la ĝardenon.

De tiu momento ĉiuj maŝinistoj kaj hejtistoj el la preterirantaj vagonaroj, ĵetis karbojn al la simio. Kelkfoje ili trafis, sed plejofte ili maltrafis la malamatan fibeston, kiu restis ĉiam moke ridetanta — ĉiam — ĉiam.

Kaj dumnokte la avarulo aperis en sia ĝardeno kun granda sako, en kiu li kolektis la karbojn, ĵetitajn el la vagonaroj, kaj ridis kontente.

„He, he,” li murmuris, „denove plenan sakon; la simio estas utila besto.”

Ĉu vi komprenas la ruzon?

Sybrandaburen,

G. TINKELENBERG.

LA STULTAJ MUSOJ.

La musoj aranĝis grandan kunvenon. Ili preparolis, kiel serĉi ŝirmon kontraŭ la danĝera kato .

Sed kion fari? La plej saĝaj el ili pritraktis la aferon dum longa tempo. Fine juna museto diris: „Mi scias, kiel ni solvos la problemon. Ni ligos al la kato tintilon kaj poste ni aŭdos ĝin jam de malproksime kaj havos tempon por kuri al niaj kaŝejoj.”

Ĉiuj ĝojis pri ĉi tiu propono. Sed la ĝojo ne daŭris, ĉar maljuna muso demandis: „Kiu ligos la tintilon al la kato?”

Tuj ĉiuj mutis kaj unu museto post la alia ŝteliris for.

La kato ĝis nun ankoraŭ ĉiam ĉasas sen tintilo kaj la musoj ankoraŭ ĉiam sentas timegon.

Galtrup. Danujo

M. JENSEN.

(Similan rakonton mi ricevis de „Wiesböck.” (Aŭstrio).

LA DEKSESA LECIONO.

A. Petro estas **tiel** alta, **kiel** Karlo. Petro saltas **tiel** alte, **kiel** Karlo. Li estas **pli** alta **ol** mi. Li saltas **pli** alte **ol** mi.
Li estas **la plej** alta **el** la klaso. Li saltas **plej** alte **el** ni.

B. Tiu tablo estas **tiel** granda **kiel** tiu ĉi. Tiu tablo estas **pli** granda **ol** tiu ĉi. La tria tablo estas **la plej** granda **el** ĉiuj tabloj. Petro estas **tiel** forta **kiel** Karlo. La hundo estas **pli** forta **ol** la kato. La turo estas **pli** alta **ol** la preĝejo. La **elefanto** estas **pli peza ol** la leono. El la knaboj, Karlo estas **la plej dika**. Mi skribas multe. Li skribas **pli** multe. Ŝi skribas **plej** multe. Tiu ĉi **ĥoro** kantas **plej** bele.

LA AVIDA HUNDO.

C. Hundo **ŝtelis** pecon da **viando** kaj kuris al **rivereto**. En la klara akvo la ŝtelisto vidis la spegulbildon de la viando kaj ĝi **opiniis**:

„Tio estas ankaŭ peco da viando!” La manĝegulo malfermis la buŝon por kapti ĝin. Sed kiam ĝi malfermis la buŝon, la viando el-falis kaj fornaĝis sur la akvo.

Do la bildo en la rivereto malaperis. Kaj **anstataŭ** du pecojn, **nia stulta** hundeto havis nenion!

LA RANO KAJ LA BOVO.

D. Sur herbejo sidis rano kaj kvakis. Sur la sama herbejo estis bovo. La rano vidis la grandan beston. **Subite** ĝi pli laŭte kvakis pro **envio** pri la **eksterordinara** grando de la bovo. Ĝi **plenblovis** sin kaj demandis la **idojn**: „Ĉu mi nun estas pli granda ol la bovo?”

„Ne,” respondis la idoj.

Nun ĝi plenblovis la **haŭton** plie kaj ree demandis: „Kiu nun estas pli granda? Kvak!”

„**Kompreneble** la bovo!” respondkvakis la idoj.

Nun la fera rano koleris kaj **riskis** lastan **ŝancon** kaj **krevis**.
Tuj ĝi mortis.

- I. Lernu parkere la novajn vortojn en A, B, C, D.
- II. Traduku A, B, C, D, en vian gepatran lingvon.
- III. Post kelkaj tagoj traduku A, B, C, D el via gepatra lingvo en Esperanton.
- IV. Lernu parkere la rakonton pri „La avida hundo.”
- V. Respondu al la demandoj:

Kie estis la rano? Kion ĝi faris? Ĉu ĝi estis sola? Kion vidis la rano? Ĉu la rano ŝatis la bovon? Kial la rano enviis la bovon? Kial ĝi plenblovis la haŭton? Kion ĝi demandis al la idoj? Ĉu la idoj konsentis? Ĉu la rano estis kontenta pri la respondo? Kion ĝi nun faris? Ĉu ĝi nun sukcesis? Kion respondis la idoj? Kion faris la fiera rano? Kio okazis?

LA DEKSEPA LECIONO.

ĈU NI MANGOS PAT-KUKOJN?

Estis en **Marto** kaj la vetero estis malvarma. La patro, patrino kaj la du infanoj, Petro kaj Manjo estis en la ĉambro. Petro parolis pri la **kolomboj**. La patro diris: „Petro, zorgu bone pri viaj kolomboj. Ili **kovas** kaj tial ili mem ne havas tempon por **serĉi nutraĵon**.”

„Sed la **grenkesto** estas malplena,” respondis Petro. „Mi tuj iros al la butikoj por aĉeti novan grenon.”

„Ne nun,” respondis la patrino. „Nun la vento estas tro malvarma. Atendu ĝis post la tagmezo. **Eble** tiam la vetero estos bona.”

Kaj vere, post la tagmezo brilis la suno.

„Iru nun al Sablo por nutraĵo kaj kun**prenu** ankaŭ **funton** da sukero.”

„Ĉu mi povos porti **ĉion**?” demandis Petro.

„Ankaŭ mi povas porti ion,” diris Manjo.

„**Certe**,” diris la panjo, „Vi ne estas tiel malgranda! Vidu, Petro portos la monon, kaj vi la korbeton. Kaj kiam vi revenos, Manjo portos la sukeron kaj **farunon** en la korbeto kaj Petro la grenon.”

Petro prenis la korbeton el la kuirejo.

„Ĉu ni mangos **pat-kukojn**, panjo?” demandis Manjo.

„Kial vi demandas tion?”

„Ĉar ni devas aĉeti sukeron kaj farunon.”

„Ni mangos patkukojn!” diris Manjo sur la vojo.

Post dek **minutoj** ili estis ĉe la butikisto.

Petro diris: „Tri litrojn da greno, mi petas.”

Sablo komencis **mezuri**. „Tri litrojn, ĉu ne?”

„Jes.”

Sablo zorge mezuris. Fine li estis preta.

„Ankaŭ litron da sukero,” diris Manjo. Ankaŭ ŝi volis mendi ion. Petro **bezonis** fari ne ĉion!

„Litron?” ridis la butikisto, „sukeron mi ne vendas je litro.”

„Funton,” diris Petro, „kaj funton da faruno.”
 „Jes, unu funton,” diris Manjo. „La patrino bakos patkukojn!”
 Sablo denove ridis. Li **pesis** la sukeron kaj la farunon. Petro pagis.



„Ĉu vi ŝatas kuketojn?” La butikisto donis tri al ambaŭ. La infanoj **volonte akceptis**. Poste la infanoj iris hejmen.

- Lernu bone la novajn vortojn.
- Traduku la rakonton en vian gepatran lingvon.
- Legu kelkfoje la lecionon kaj respondu al jenaj demandoj:

El: „Ligthart en Scheepstra, Dicht bij Huis,” J. B. Wolters, Groningen-Den Haag-Batavia.

Ĉu la vetero estis bela? Pri kio parolis Petro? Kial Petro ne povis doni grenon al la kolomboj? Kion faris la kolomboj? Kial Petro ne povis iri al la butikoj? Kien iris Petro kaj lia fratineto post la tagmezo? Kion ili devis aĉeti? Ĉu ankaŭ la fratineto portis ion? Kion demandis Manjo? Kial ŝi demandis tion? Ĉu ili baldaŭ estis en la butikoj? Kion diris Manjo al Sablo? Ĉu tio estis bona? Kion la infanoj ricevis? Kiam ili foriris?

Uzu la jenajn vortojn en frazoj:

io, iam, kio, kia, kial, kiam, kie, kiom, kiu, tiam, tie, tiel, tio, tiu, neniam, nenio, ĉiam, ĉie, ĉiu ĉio.

LA URSOFELO.

Du junaj ĉasistoj aŭdis pri granda, forta urso, kiu vivis en arbaro. Ili deziris ĝin mortpafi kaj jam ĝojis pri la bela felo, kiun ili esperis akiri.

La unua diris: „Se mi mortpafos la urson, mi preparos el la felo varman pelton.”

„Ne,” diris la dua, „Mi pafos la urson kaj vendos la felon, kaj posedos multe da moneroj!”

Dume ili venis en la arbaron. De malproksime ili aŭdis la paŝojn de la urso kaj ili timetis. La urso alproksimiĝis kaj murmuregis. Kiam aŭdis ĉi tion la dua junulo, kiu intencis vendi la ursopelton, li forĵetis la pafilon kaj rapide grimpis sur arbon. La unua ne plu havis tempon por rifuĝi. Feliĉe li rememoris, ke la ursoj ne atakas malvivan homon. Li do ĵetis sin teren kaj ŝajnigis esti senviva.

La urso furioze paŝegis al li. La junulo ne movis sin. La urso flaris lin, kaj ĉar ĝi ne rimarkis eĉ unu spireton, ĝi tuj forkuris kaj neniel difektis la ĉasiston.

Kiam forestis la terura besto, la bedaŭrindaj du kuraĝuloj ree viviĝis kaj komencis paroli pri la timiga aventuro.

La junulo, kiu estis sur la arbo, degrimpis kaj demandis sian kunulon: „Diru, kion flustris la urso en viajn orelojn?”

„Ne ĉion mi komprenis,” respondis la alia. „Sed du frazojn mi tre klare aŭdis. En la dekstran oreton ĝi diris: „Oni ne vendu la felon de la urso, antaŭ ol oni havas la urson.” En la maldekstran oreton la urso flustris al mi ĉi tion: „Kiu forlasas sian amikon en danĝero, tiu estas malbona homo!”

KORESPONDADRESO: ĉiu vorto: 0,03 gld.

Nederlando: 30 infanoj deziras multajn korespondaĵojn el ĉiu mondparto. Ni nepre respondos. Adreso: K. Stiekel, Gasthuisvest 31 (rood) ,Haarlem.

Francio: K. ino Andree Amiko, 14-jara, dez. kor. kun gekamaradoj samaĝaj el ĉl. Strato Belmont 2, Montpellier (Hlt) Francio.

DU KALKULOJ.

Iun tagon la malgranda Karlo aŭskultis sian patron, kiu parolis pri kalkuloj. Subite Karlo ekhavis la kuriozan ideon, sendi al sia patrino kalkulon por la servoj, kiujn li faris al ŝi.

Post kelkaj tagoj trovis la patrino apud sia telero jenan paperton:

La patrino ŝuldas al sia filo Karlo:

Por alporto de alumetoj	20	groŝojn
Por porti leterojn al la poŝtofacejo	10	„
Ĉar li estis ĉiam obeema knabo	15	„
Por alporto de poŝtmarkoj	20	„
sume	65	„

La patrino, leginte la leteron, diris nenion, sed ŝi elpensis ion, por superruzi sian etan bubon.

Vespere Karlo trovis apud sia telero la 65 groŝojn. Tre kontente li enpoŝigis la monon. Samtempe li tamen trovis kalkulon de la patrino al li:

Kalkulo por mia filo Karlo:

Por loĝado dum dek jaroj	neniom
„ manĝaĵoj dum dek jaroj	„
„ lavado kaj flikado de liaj vestoj	„
„ flegado dum lia malsano	„
„ ĉiuj aliaj penoj	„
Ĉar ŝi estis ĉiam bona patrino	„
entute	neniom

Leginte la kalkulon, Karlo momenton silentis. Poste li ŝteliris al la patrino kaj metis la 65 groŝojn en ŝian poŝon.

Bruck a/M. Aŭstrio.

JOZEF TRÖLS.

(Similan rakonton mi ricevis de „Bourniche.” Francio).

MALALTIKO DE LA REKLAMTARIFO:

I paĝo: 15 gld.; ½ paĝo: 8 gld.; ¼ paĝo: 4,5 gld.; ⅛ paĝo: 2,5 gld.;

Abonu „Verda Revuo”. Sendependa gazeto pri arto, scienco kaj amuzo. Aperas monate. Jarabono 3,50 svfr. Mendebla ĉe la administrejo: Wien VII, Hermansegasse 31/26 Austrujo.



„FLORETOJ”
Porinfanaj Rakontoj
tradukitaj de la
„VENDREDA KLUBO”
en Winschoten
(Nederlando)

Jarkotizo

Aŭstrujo	3.20 ŝil.
Britujo	3 ŝil.
Belgujo	15 fr.
Ĉeĥoslovakujo	16½ C. kr.
Danujo	3 kr.
Franĉujo	10 fr.
Svislando	2. 10 fr.
U.S.A.	0.70 dol.
Germanujo	1.75 M.
Hispanujo	5 pes.
Norvegujo	2.7 kr.
Polujo	3.6 zl.
Svedujo	2.70 kr.

Kun multaj koloraj kaj nigraj
bildoj
de C. Jetses
prezo 0.70 ned. guld.

Aĉetebla en ĉiu librejo kaj ĉe la
eldonisto:

J. B. WOLTERS

**Groningen — Den Haag
Batavia.**

Legu la belajn librojn, eldonitajn de la Brita Esperanto Asocio.

H. G. Wells: La dormanto vekiga. Trad: A. E. Milward. nun Bind: 1.25 guld.

G. Gladstone: Esperanto por infanoj. Bind: 0,55 guld.

K. R. C. Sturmer: Facila legolibro. 0,40 guld.

E. A. Payson; Juneco kaj amo. Bind: 0,75 guld.

H. Rider Haggard: Luno de Israel. Bind: 1,25 guld.

C. Collodi: Pinokjo (interesa por plenaĝuloj kaj infanoj).
Bind: 1,25 gld.

K. R. C. Sturmer: Por recenzo. 0,90 guld.

Olive Schreiner: Romano pri afrika bieno. Trad: Prof. Brown kaj S. A. Andrew. Bind: 2,15 guld.

Charles Dickens: La vivo de nia Sinjoro Jesuo. Trad. M. C. Butler. Bind: 2,15 guld.

1 guldeno ± 2.1 sv. fr.

Ĉi tiuj libroj estas ankaŭ mendeblaj ĉe la redakcio de „La Juna Vivo”.

*) Abonantoj, kiuj ne rajtas sendi monon eksterlanden, povas pagi per 7 respondkuponoj.